**Aigné :**

# Les 30 ans de la bibliothèque 'Gaston Waringhien' à Aigné

Le vendredi 18 novembre, quelques membres de notre association se rendirent à Aigné, petite commune à 10 kilomètres du Mans, invités par la bibliothèque Waringhien qui fêtait ses 30 ans.
Les espérantistes du G.E.M. sont en effet à l'origine du nom de baptême de cette bibliothèque. Gaston Waringhien est enterré dans le cimetière d'Aigné avec sa femme car leur fille habitait alors cette commune. Cela fut rappelé dans le discours de la bibliothécaire.
Pour cette soirée, les élèves de l'école primaire nous présentèrent, d'une manière très vivante, comment un livre vient au monde avec toutes les étapes depuis l'auteur jusqu'à l'édition. Ceci était complété par une exposition pop-up*.
La soirée se poursuivit agréablement grâce à Sophie Kluzek, très habile conteuse de La Ferté-Bernard. Elle anima joyeusement cette soirée. Le choix de ses contes était judicieux puisqu'ils enchantaient à la fois enfants et adultes.
Accompagnée de son orgue de Barbarie, elle nous a même fait chanter quelques chansons de notre jeunesse que les enfants semblent encore connaître.

Nous remercions Aigné et l'équipe des bénévoles de la Bibliothèque pour cette agréable soirée. Nous n'oublions pas l'accueil que la commune d'Aigné avait réservé au G.E.M. en 2001.

Christiane Boutier

***Urbeto* Aigné :**

# La 30-a jariĝo de la biblioteko 'Gaston Waringhien' en la urbeto Aigné

Vendredon la 18-an de novembro kelkaj membroj de nia asocio veturis al Aigné, eta urbo je 10 kilometroj for de Le Mans, invititaj de la estraro de la biblioteko Waringhien, kiu festis sian 30-an jariĝon.
Efektive, el la esperantistoj de la G.E.M. originas la nomo de tiu biblioteko. Gaston Waringhien estas enterigita en la tombejo de Aigné kun sia edzino, ĉar ilia filino tiam loĝis en tiu vilaĝo. Tio estis memorigita en la parolado de la bibliotekistino.
Okaze de tiu vesperkunveno la lernantoj de la unuagrada lernejo prezentis al ni laŭ tre vivanta maniero, kiel libro naskiĝas laŭ ĉiuj etapoj, ekde la aŭtoro ĝis la eldono. Tio ĉi estis kompletigita per pop-up (faldofiguraj libroj) ekspozicio.
La vesperkunveno agrable daŭris dank' al Sophie Kluzek, sperta rakontistino de urbeto La Ferté-Bernard. Ŝi ĝoje vigligis tiun vesperon. La elekto de tiuj fabeloj estis sagaca, ĉar ili plaĉegis same al infanoj kaj plen-kreskuloj.
Kun sia gurdo ŝi kantigis al ni kelkajn kanzonojn de nia junaĝo, kiujn la infanoj ŝajnas ankoraŭ koni.

Ni dankas Aigné kaj la skipon de la bonvoluloj de la biblioteko pro tiu agrabla vespero. Ni ne forgesas la akcepton, kiun la municipo de Aigné atribuis al la G.E.M. en 2001.

Christiane Boutier